Heinrich Heine,

# Elkora diro

*tradukita de Karl Vanselow*

Mi volus, ke tuta la forto
De l' amo el mia kor'!
Kuniĝu en unu vorto.
La vento ĝin portu for.

Al vi kun flustra kareso
Ĝin portu la venta spir',
Por ke vi memoru sen ĉeso
La ardon de mia sopir'.

Kaj kiam vi kuŝos en dormo,
Ĝi sonu kun mara bru',
Ĝi sonu kun forto de ŝtormo
Tra viaj sonĝoj plu.

*Traduko de la Germana poemo "Ich wollt, meine Schmerzen ergössen" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Karl Vanselow *(∗1877-03-20 – †1959-12-28).*

*Arg-507-995 (2014-06-20 21:09:39)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis ti-un ĉi poem-tradukon en la retejo* http://esperantoplatz.wikispaces.com/Vanselow+und+Esperanto. *Pri la tradukinto Karl Vanselow rigardu ankaŭ la vikipedian paĝaron* http://eo.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow. *La poem-traduko aperis ankaŭ en la n-ro 7(902)de la revuo "Heroldo" de l' 22.11.1936.*

Heinrich Heine,

# Ich wollt, meine Schmerzen ergössen

Ich wollt, meine Schmerzen ergössen
Sich all in ein einziges Wort,
Das gäb ich den lustigen Winden,
Die trügen es lustig fort.

Sie tragen zu dir, Geliebte,
Das schmerzerfüllte Wort;
Du hörst es zu jeder Stunde,
Du hörst es an jedem Ort.

Und hast du zum nächtlichen Schlummer
Geschlossen die Augen kaum,
So wird dich mein Wort verfolgen
Bis in den tiefsten Traum.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17).*

*Arg-507-994 (2010-01-23 18:22:14)*

*Entnommen aus der Sammlung von Liebesgedichten Heinrich Heines* http://www.deutsche-liebeslyrik.de/eine_alle_gedichte_a_bis_k.htm#g101,.